
# Manlibro pri Vikipedio

## Verku vian unuan Vikipedian artikolon en 1 tago




Aŭtoroj:
Michal Matúšov (KuboF Hromoslav)
Michael Boris Mandirola

# Enkonduko

Kara leganto, vi legas manlibron, kiu celas helpi vin komenci vian padon al kontribuado al Vikipedio. Jam tiu ĉi baza fakto estas signifa – ĝi montras, ke vi interesiĝas pri Vikipedio kaj pretas ion fari. Tiu ĉi via intereso tre ĝojigas nin!

Nia projekta teamo (Vikimedio EO; E@I; Esperanto-Kultur-Centro en Tuluzo; Bjalistoka Esperanto-Societo) pasigis pli ol jaron plenumante projekton subtenitan de Erasmus+, al kies rezultoj apartenas serio de ĉeestaj trejnadoj, reta videa kurso kaj ankaŭ tiu ĉi manlibro. Post tiu multa laboro ni aparte aprezas, ke via intereso donis sencon al la laboro!

Tiu ĉi manlibro rilatas al la menciita videa kurso. Ĝi parte estas ĝia kondensita versio, prezentanta ĝiajn plej esencajn partojn. Mi invitas vin spekti ankaŭ la kurson por lerni pri aferoj, kiuj ne povis eniri la manlibron, aŭ estas prezentitaj nur supraĵe. Sed ĝi estas uzebla ankaŭ sendepende por memlernado. Kiel ajn vi decidos lerni kontribuadi al Vikipedio, tiu ĉi manlibro servos al vi kiel baza referenca fonto, kiu helpos vin aŭ tuj kompreni la aferon, aŭ trovi pli detalajn fontojn.

La videa kurso kaj aliaj materialoj de la projekto estas en:
`https://esperanto.wiki/vipe`

## KIEL UZI TIUN ĈI MANLIBRON?

Tiu ĉi manlibo estas koncipita por helpi al vi kiom eble plej frue praktike kontribui al Vikipedio. Ankaŭ tial ĝi preterlasas plurajn detalojn. Sed por tio estas bezonata ioma teoria enkonduko por ke vi havu sufiĉe klaran ideon kio Vikipedio estas kaj kio ĝi ne estas.

La ĉapitro "Vikimedio" estas tre teoria kaj grandperspektiva – vi povas sekure trasalti ĝin, se vi volas ekkontribui kiom eble plej frue. En la ĉapitro "Vikipedio" certe legu almenaŭ la parton "Principoj kaj reguloj", ĉar ili helpos, ke viaj artikoloj vere restu en Vikipedio por longa tempo! Unu el la prezentitaj principoj, libereco, estas tiom grava (kaj ĝia rompo estas kutima kialo por forigoj de artikoloj), ke ni decidis prezenti ĝin pli detale en memstara ĉapitro. Certe ĝin legu, kaj ĝi helpos al viaj artikoloj esti bona parto de Vikipedio!

Post tiu ĉi baza teoria enkonduko vi venos al la praktika parto. Ĝi estas koncipita por helpi vin praktiki la ĵus lernitan aferon tuj post lego de nur mallonga subĉapitro. Do jam tute komence kuraĝu fari rekte en Vikipedio tion, kion vi ĵus legis! Rapideco de implementado helpos vin atingi brilajn rezultojn!

Post kiam vi iomete spertiĝos pri Vikipedio, relegu la tutan manlibron. Vi ĝin komprenos je tute nova nivelo, rimarkos nuancojn kaj konektos aferojn antaŭe disajn. Tio akcelos disvolvon de viaj Vikipediaj kapabloj kaj pliĝuigos vian kontribuadon.

# Vikimedio

Vikipedio, pri kiu temas tiu ĉi manlibro, estas unu el pluraj eroj de la Vikimedia universo. Sed la vorto "Vikimedio" povas havi pluraj signifojn. Ĝi estas uzata por paroli pri movado, komunumo, diversaj organizoj... Do por komencu ni klarigu ĝin!

## VIKIMEDIAJ MOVADO KAJ KOMUNUMO

*lingva noto: En la esprimo "Vikimedia projekto", la vorto "projekto" celas specifan vikion aŭ aron da vikioj, kiu(j)n prizorgas la Fondaĵo Vikimedio. Vidu sube liston da ili.*

Vikipedio, kaj poste aliaj Vikimediaj projektoj, estis starigita por provizi per facila kaj senpaga aliro al tuta homara sciaro. Tradicie, scioj kaj edukado estis multe pli bone disponeblaj por pli monhavaj homoj. Tiel Vikimedio helpas malplialtigi la baron por edukado kaj "demokratiigi sciojn".

Ĉirkaŭ Vikipedio naskiĝis socia movado celanta plibonigi mondon per libera edukado provizita per Vikimediaj projektoj. Aktivuloj de la Vikimedia movado verkas, tradukas kaj poluras artikolojn en Vikimediaj projektoj, varbas aliulojn por tia kontribuado, organizas komunumajn virtualajn kaj ĉeestajn eventojn, kampanjojn, konkursojn, starigas partnerecojn ks. Iuj eĉ starigas Vikimediajn organizojn, kiel ankaŭ nia Esperant-lingva Vikimedio EO: `https://esperanto.wiki`

## VIKIMEDIAJ PROJEKTOJ

La Fondaĵo Vikimedio prizorgas plurajn (vikimediajn) projektojn, de kiuj la plej fama estas sendube Vikipedio. Kutime ni nomas ilin "frataj projektoj".

Iuj el ili estas plurlingvaj, centrigitaj, aliaj ekzistas en diversaj, sendependaj lingvaj versioj. Krom la sube menciitaj, ekzistas ankaŭ "fonaj" projektoj, kiuj prizorgas teĥnikan kaj organizan infrastrukturon – kvankam ankaŭ ili estas vikioj, ili ne estas interesaj por tiu ĉi manlibro.

**Vikipedio** `eo.wikipedia.org` estas ĝenerala enciklopedio. Ĝi celas prezenti la plej akuratan kaj aktualan scion pri ĉiuj menciindaj aferoj de pluraj perspektivoj.

**Vikifontaro** `eo.wikisource.org` estas kolekto de originaj fontaj dokumentoj, ekz. libroj, gazetoj, leteroj, kantotekstoj, paroloj de politikistoj kaj artikoloj de retgazetoj. Grava parto de kontribuado estas transskribado de skanaĵoj kaj ilia provlegado. Temas pri kiom eble plej faksimila prezento de alia verko, do ne pri origina verkado.

**Vikivojaĝo** `eo.wikivoyage.org` estas vojaĝa gvidilo celata al turistoj kaj veturantoj. Ĝi fokusiĝas pri praktikaj aferoj utilaj por veturado, ekz. kiel alveni, kie loĝi, kie kaj kion manĝi, trinki kaj drinki, kiel resti sukura kaj sana, kion interesan vidi kaj sperti, ks. Interese, ĝi ne limiĝas nur al Tero 😎 Ĝi baziĝas sur tre malmultaj specoj de artikoloj, plej notinde pri landoj, regionoj, urboj, vilaĝoj kaj konversaciaj frazlibroj – ĉiuj artikoloj de konkreta speco havas (preskaŭ) saman strukturon.

**Vikilibroj** `eo.wikibooks.org` estas kolekto de komunume verkataj lernolibroj kaj manlibroj (kompare al Vikifontaro, kiu nur senŝanĝe stokas eksterajn verkojn). Interesaj ĝiaj subprojektoj estas libroj por infanoj kaj kuirlibroj.

**Vikicitaro** `eo.wikiquote.org` estas kolekto de citaĵoj de kaj pri homoj kaj fikciajn rolulojn, verkoj kaj temoj, kaj ankaŭ de proverboj. Simile al Vikifontaro, ĝi senŝanĝe stokas tekstoj de aliaj fontoj, do kontribuantoj ne kreas originan enhavon (kun eta escepto por enkonduko ks.).

**Vikivortaro** `eo.wiktionary.org` estas vortaro kaj tezaŭro celanta priskribi ĉiujn vortojn kaj idiotismojn de ĉiuj lingvoj. Ĝi provizas ankaŭ per informoj kiel etimologia deveno, signifo, sinonimoj, antonimoj, tradukoj, deklinado, rimoj ks. Por multaj vortoj disponeblas sondosiero kun laŭtlegita elparolo.

**Vikinovaĵoj** `eo.wikinews.org` estas ĝeneralnovaĵa retejo. Ĝi celas provizi per ĵurnalismaj artikoloj pri gravaj aktualaj okazaĵoj de la tuta mondo.

**Vikiversitato** (dume en `beta.wikiversity.org/wiki/Ĉefpaĝo` celata iam ekzisti en `eo.wikiversity.org`) estas eduka portalo, iom simila al reta universitato. Ĝi provizas per edukaj materialoj en diverstemaj kursoj, preter simplaj lernolibroj, kaj ebligas al komunumoj lerni kune. Nuntempe (2023) ĝi estas lasta Vikimedia projekto sen memstara Esperanta versio.

**Subaj projektoj estas plurlingvaj / lingvo-sendependaj, centrigitaj.**

**Komunejo** `commons.wikimedia.org` estas centra stokejo de plurmediaj dosieroj uzataj en ĉiuj Vikimediaj projektoj. Ekz. plejparto de bildoj, kiuj estas en Vikipedio, estas montrataj reke de Komunejo. Ĝi stokas bildojn, sonaĵojn, videojn, PDF-dokumentojn, 3D-modelojn ks. La stokitaj dosieroj povas havi plurlingvan priskribon kaj maŝine legeblajn atributojn.

**Vikidatumoj** `wikidata.org` estas datumbazo legebla kaj redaktebla de kaj homoj kaj robotoj. Ĝia enhavo estas interligitaj datumoj, kiuj priskribas la temon de sia datuma ero, kaj metadatumoj pri artikoloj en aliaj Vikimediaj projektoj (ekz. ligiloj al alilingvaj versioj, statuso de artikolo ks). Ĝi enhavas

ankaŭ leksikografiajn datumojn pri vortoj kaj idiotismoj. Vikidatumoj parte laboras pri la samaj aferoj kiel Vikivortaro kaj Vikispecioj. Pli kaj pli ofte estas datumoj de Vikidatumoj uzataj en artikoloj en aliaj Vikimediaj projektoj (ekz. en informkestoj en Vikipedio) kaj tiu ĉi uzo certe plioftiĝos. Ĝia specifaĵo estas ekstreme libera permesilo uzata por la ĉefa enhavo – CC0 – kiu ebligas vastegan reuzadon, sen pezigo de bezono obei limigajn kondiĉojn, kiujn postulus aliaj permesiloj.

**Vikifunkcioj** `wikifunctions.org` estas projekto por difinado de funkcioj por programado, lanĉeblaj rekte en Vikimediaj projektoj. Ĝi forte rilatas al projekto *Abstrakta Vikipedio*, kiu celas prezenti bazajn kvazaŭ-Vikipediajn artikolojn surbaze de datumoj de Vikidatumoj kaj per funkcioj de Vikifunkcioj. Nuntempe (2023) ĝi estas en prepara fazo.

**Vikispecioj** `species.wikimedia.org` stokas biologiajn datumojn pri organismoj, ekz. ties sciencan nomon kaj taksonomion. Ĝia celo estis grandparte prilaborita ankaŭ per Vikidatumoj, kaj en maŝine legebla formo.

**Vikimedia Kovilo** `incubator.wikimedia.org` estas projekto, kie estas disvolvataj novaj lingvaj versioj de Vikimediaj projektoj. Kiam disvolviĝas sufiĉe aktiva komunumo de kontribuantoj, tiu specifa lingva versio de tiu specifa projekto maturiĝas, kaj estas movita al sia propra subdomajno. Por Esperanta projekto tio lastfoje okazis en 2020 kiam de Kovilo maturiĝis la Esperanta Vikivojaĝo.

Ĉiuj vikimediaj projektoj estas verkataj kaj kontrolataj de komunumaj kontribuantoj. Ne ekzistas iu centra aŭtoritatulo, kvazaŭ ĉefredaktoro, kiu aprobadus novajn artikolojn. Sed la samaj uzantoj, kiuj verkas artikolojn, ankaŭ rigardas kaj kontrolas artikolojn verkatajn de aliaj uzantoj. Teĥnike, iu uzantoj havas pli altajn rajtojn, notinde *administrantoj*, kiuj povas forigi artikolojn ks. Sed ankaŭ ili rajtas uzi tiujn rajtojn nur kongrue kun la reguloj kaj volo de la komunumo.

# Vikipedio

Vikipedio estas la unua kaj sendube la plej fama Vikimedia projekto. Ĝi markis la veran komencon de la Vikimedia movado kaj daŭre restas ĝia (duonoficiala) flagportanto.

## UTILO DE VIKIPEDIO

Vikipedio utilas per diversaj manieroj, pluraj el ili ne tre rimarkataj.

Vikipedio ege helpas stoki kaj disvastigi liberan scion por sia lingva komunumo. Ekz. en Esperanto ĝi estas ununura funkcianta ĝenerala enciklopedio. Ofte ĝi troviĝas en unuaj lokoj por retaj serĉoj en Esperanto, ĉar ĝia artikolo estas unu el nemultaj uzoj de iu specifa Esperanta vorto. Ankaŭ tiel ĝi helpas firmigi lingvuzadon de Esperanto

Kiel leganto vi povas lerni freneze multe simple legante enhavon de Vikipedio. Sed kiel redaktanto vi aldone plibonigas vian lingvouzadon kaj lernas kaj trejnas teĥnikajn kaj sociajn kapablojn por virtuala kunlaborado. Spertoj de Vikipedio helpos vin ekz. ĉe verkado de universitata disertaĵo, ĉar vi jam scios kion kaj kiel citi.

Kaj kun tiuj ĉiuj spertoj vi ankaŭ estos pli bona civitano. Vi pli facile rimarkos nefidindajn fontojn, nebulajn informojn, kaj povos respondece trakti amaskomunikilojn. Vi pli kapablos vidi diversajn perspektivojn kaj trovi la plej objektivan aserton, pri kiu plej multaj homoj povas konsenti. Vi estos pli kapabla kontribui al scia socio, cifereca transformiĝo, inkludo, diverseco kaj tiel ankaŭ al paco.

## DIVERSAJ LINGVAJ VERSIOJ DE VIKIPEDIOJ


La tuta Vikipedia projekto komenciĝis per la anglalingva Vikipedio la 15-an de Januaro 2001. Jam en sekvaj monatoj estis starigitaj versioj en kelkaj aliaj lingvoj. La Esperanta Vikipedio estis kreita en Novembro 2001 kiel nur 11-a versio de Vikipedio. Ĝis nun estas Esperanto aprezata en la Vikimedia movado pro sia frua adopto de Vikipedio.

Unuopaj lingvaj versioj de Vikipedio estas sendependaj unu de la alia. Kvankam redaktantoj ofte tradukas artikolojn de alilingvaj Vikipedioj, tio ne estas nepraĵo. Aldone, post kiam artikolo estas tradukita, ĝi kutime disvolviĝas iom malsame en la malsamaj Vikipedioj. Tial estas tute kutime, ke artikolo pri la sama temo havas en malsamaj Vikipedioj iom alian enhavon. Tio ofte dependas de fontoj disponeblaj en koncerna lingvo. Ankaŭ en tiaj situacioj pli avantaĝas, kiam Vikipedio estas redaktata do homoj kun kapabloj pri tre diversaj lingvoj.

Kvankam unuopaj lingvaj versioj de Vikipedio estas sendependaj unu de alia, ili ankaŭ estas konektitaj. Artikoloj ligas al samtemaj artikoloj en aliaj lingvoj per *interlingvaj ligiloj*, familiare nomataj *intervikioj* ☛. Tiel legantoj povas facile kompari informojn en diversaj lingvoj, kiujn ili regas, por pli objektiva scio. Kaj redaktantoj tiel povas inspiriĝi pri taŭga enhavo, rekte traduki, aŭ ekscii pri taŭgaj fontoj por citi asertojn.

Nuntempe (2023) ekzistas 326 memstaraj Vikipedioj (ekster Kovilo). Tamen, nur ĉirkaŭ duono de ili havas almenaŭ 10 000 artikolojn. La Esperanta versio estas en la 36-a loko, kun iom pli ol 345 000 artikoloj. Kvanto de artikoloj estas facile mezurebla, sed problema indikilo. Ekz. iuj Vikipedioj postulas sufiĉe altan kvaliton de ĉiu nova artikolo, do ilia kvanto kreskas malpli rapide. Aliaj Vikipedioj estas tre akceptemaj pri novaj artikoloj, sed ofte ilia kvalito ne estas brila. Ne ekzistas ununura indikilo, per kiu eblus kompari entutan kvaliton de diversaj Vikipedioj. Tial estas uzataj pluraj indikiloj,

inklude kvanto de redaktoj, kvantoj de registritaj kaj aktivaj uzantoj, kvanto de administrantoj, tn. *profundeco* (kiu pli-malpli mezuras nivelon de detala laborado, aŭ kunlaborado) kaj similaj, por doni uzeblan imagon. Aldone, objektive kompari socian influon inter diversaj Vikipedioj estas eĉ pli malfacila.




*Intervikioj. Maldekstre: alklakitaj, dekstre: en normala stato.*

# Principoj kaj reguloj

Ĉiuj Vikimediaj projektoj havas siajn principojn, regulojn, gvidliniojn kaj kutimojn. Eĉ inter diversaj lingvaj versioj de Vikipedio ili iom malsamas. En tiu ĉi manlibro estas spaco nur por kelkaj plej gravaj. La aliajn vi malkovros dum via kontribuado, same kiel ĉiuj aliaj Vikimedianoj faris antaŭ vi. Jen estas bona superrigardo:

`https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Kvin_principoj`

`https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Regularo`

## MENCIINDECO

*Pli en* `https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Menciindeco`

Menciindeco indikas ĉu la koncerna koncepto meritas propran artikolon. Tio estas determinata per eksteraj, gravaj, aŭtoritataj, sendependaj fontoj. Se ne ekzistas rilataj eksteraj fontoj pri la temo, ĝi verŝajne ne meritas propran artikolon. En iuj okazoj eblas pri la temo verki en rilata artikolo, ekz. en artikolo pri verkisto povas esti sekcio pri ties libro.

## NEŬTRALA VIDPUNKTO

*Pli en* `https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Neŭtrala_vidpunkto`

En Vikipedio ni strebas prezenti sciojn plejeble neŭtrale, senpartie. Homoj ĝenerale havas diversajn opiniojn, ideojn, perspektivojn, kaj Vikipedio respektu tiun diversecon. Tial ne nur por rezulta kvalito de Vikipedio, sed ankaŭ por bona kunlaborado gravas, ke artikoloj prezentu ĉiujn majoritatajn opiniojn pri la temo, kaj eventuale ankaŭ plej gravajn minoritatajn.

Rilate al neŭtrala vidpunkto ni distingas jene:

- ▷ **fakto:** aserto ne grave disputata
- ▷ **opinio:** aserto disputata

Klasika ekzemplo estas Jesuo Kristo. La vortumo "*Jesuo Kristo estas la filo de Dio*" estas vaste disputata opinio. Sed la vortumo "*Laŭ kristanoj, Jesuo Kristo estas la filo de Dio*" estas vaste akceptata fakto. (en Vikipedio, tiu ĉi aserto tamen aldone bezonus citi taŭgan fonton per referenco; vidu "Kontrolebleco" kaj "Citado")

Kapablo verki neŭtrale estas fajna arto, kiu bezonas certajn tempon kaj praktikadon por disvolviĝo. Legu elstarajn artikolojn, kaj rimarku la prezenton de diversaj vidpunktoj por "sorbi" ĝin.

## KONTROLEBLECO

*Pli en* `https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Kontrolebleco`

Informoj en Vikipedio estu kontroleblaj en eksteraj fidindaj fontoj. Vikipedio ne rajtas enhavi tn. "originalan esploron", do asertojn, argumentojn kaj klarigojn kreitajn de Vikipedianoj mem, kiuj dume ne estis publikigitaj en ekstera fidinda fonto. Por povi kontroli kaj konfirmi Vikipediajn asertojn, ni citas la originajn fontojn per entekstaj referencoj (vidu sube).

## LIBERECO

Granda diferenco inter Vikipedio kaj plejparto de aliaj enciklopedioj estas, ke Vikipedio estas *libera*. Jure dirite, ĝi estas disponebla sub libera permesilo. Tial ne nur Vikipedianoj rajtas redakti Vikipediajn artikolojn verkitaj de aliuloj, sed la tuta homaro povas reuzadi tekstojn de Vikipedio kun nur minimumaj kondiĉoj (vidu en la ĉapitro pri *Aŭtoraj rajtoj*). Ankaŭ plejmulto de plurmediaĵoj estas libera – nur tre malgranda parto estas mallibera, sed disponebla danke al tn. *Justa uzo*.

La temo de libereco estas tre grava. Enmeto de nelibera enhavo al Vikipedio (ĉu intence aŭ neintence) estas ofta kialo por plena foriro de tiu teksto, aŭ eĉ plena artikolo. Do ni rigardu la temon pli detale en ĝia memstara ĉapitro.

# Aŭtoraj rajtoj

## KIAL KOPIRAJTO GRAVAS?

Kiam oni parolas pri kopirajtoj, kaj pli ĝenerale pri aŭtoraj rajtoj, oni fakte parolas pri homaj rajtoj. Pli precize estas la artikolo 27 de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj rekte koncernas la temon.

> *Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturan vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni sciencan progreson kaj ĝiajn fruktojn.*
>
> *Ĉiu havas rajton je protekto de la moralaj kaj materialaj interesoj rezultantaj el eventualaj sciencaj, literaturaj aŭ artaj produktaĵoj, kiujn li aŭtoris.*

Ni ne forgesu ke tiuj rajtoj – kiel ĉiuj homaj rajtoj – estas samnivelaj, nedivideblaj, interrilataj, interdependaj kaj universalaj.

## DIFINOJ

**Aŭtorrajtoj:** Aro de rajtoj, garantiitaj de ŝtataj leĝaroj por subteni kreadon de aŭtoraj verkoj. Ekzemple, la rajto kopii, distribui, komerci, transdoni.

**Kopirajto:** La plej fama el la aŭtorrajtoj: la rajto kopii.

**Rajtocedo:** Permesilo por rezigni pri parto de la aŭtoraj rajtoj. Ja eblas protekti parton de la aŭtorrajtoj sed difini kelkajn liberecojn kaj kondiĉojn; multaj permesiloj difinas la detalojn de la rajtocedo.

**Publika havaĵo:** Verko kiu ne plu estas protektata kontraŭ libera utiligo – pro decido de la aŭtoro aŭ fino de aŭtorrajta protekto. Povas temi pri ajna

produkto de homa kreemo, ĉu arta ĉu teknika ĉu alispeca kaj ĝi estas je plena dispono de ĉiuj homoj por ajna uzo (ene de normala leĝa kadro).

## VERKLIBERECO

Por difini verkon “libera”, necesas ke ĝi plenumu 4 ĉefajn liberecojn.

1. Libereco uzi verkon
2. Libereco studi kaj ŝanĝi verkon
3. Libereco fari kopion kaj distribui ĝin
4. Libereco distribui ŝanĝitan version

*Pli en* `https://freedomdefined.org/Definition`

## KREA KOMUNAĴO

Krea Komunaĵo (angle *Creative Commons*) estas rajtoceda permesilo, tre ofte uzata rete. Ĝi ebligas facile kaj malpeze rajtocedi.

Estas kvar elementoj kiujn oni povas kombini kadre de krea komunaĵoj:

- ▷ **Atribuite** (**BY**): La aŭtoro menciendas
- ▷ **Samkondiĉe** (**SA**): Ŝanĝita versio estas distribuebla nur samkondiĉe
- ▷ **Nemodifite** (**ND**): Malpermeso ŝanĝi la verkon, nur permeso uzi
- ▷ **Nekomerce** (**NC**) Malpermeso uzi ĝin por mona profito.

Jen ekzemplo:

Notindas ke verko liberas sub **CC BY** kaj **CC BY-SA** sed ne laŭ kombinoj kun **ND** kaj **NC**.

**CC0** efektive egalas kiel deklari verkon “publika havaĵo”.

## ALIAJ PERMESILOJ

Ekzistas diversaj aliaj permesiloj, ni notos ĉi tie nur kelkajn ekzemplojn:

- **GNU GPL** (Ĝenerala Permesilo de GNU): simile al CC BY-SA sed pri programaro
- **WTFPL** (*Do What The Fuck You Want To Public License*): permesas fari kion ajn sed nomŝanĝante.

## KIEL RAJTOCEDI?

Por rajtocedi necesas indiki sian volon eksplicite kun detaligo de la kondiĉoj. Plejsimple estas uzi konatajn permesilojn kiel “Krea Komunaĵo” kaj aldoni teksteton aŭ bildetojn kun la dezirataj elementoj

## LANDAJ DIFERENCOJ KAJ SPECIALAJ KAZOJ


La Konvencio de Berno protektas aŭtorrajtojn internacie ekde 1886; en ĝi membras pri ol 80% de la mondaj landoj. Laŭ ĝi verkoj protektatas aŭtomate ekde “preteco” ĝis rezigno aŭ eksvalidiĝo.

La aŭtorrajta leĝaro tamen diferencas laŭlande, ekzemple pri la eksvalidiĝo, kvankam kutime tio okazas 50–70 jarojn post la morto de la aŭtoro.


Pri specialaj kazoj, aparte menciindas Panorama libereco kaj Justa uzo.

**Panorama libereco**: la rajto foti, filmi, umi publikajn spacojn. Kelkaj landoj agnoskas tiun liberecon, tamen malsame:

- Ĉu nur konstruaĵojn aŭ ankaŭ artaĵojn?
- Ĉu nur ekstere aŭ ankaŭ interne?
- Ĉu nur nekomercocele aŭ ankaŭ komercocele?




*Panorama libereco en la mondo*



*Panorama libereco en Eŭropo*

**Justa uzo:** senpermesa uzado kiu ne damaĝas la aŭtorajn interesojn:

- ▷ *Informa* uzo
- ▷ *Eduka* uzo
- ▷ *Persona* uzo
- ▷ *Minimuma* uzo

Temas pri evidente svaga koncepto kiu tre diverse aplikiĝas laŭ la landa leĝaro.

# Redaktado de Vikipedio

Gratulon! Nun vi konas la historion kaj fonon de Vikipedio! Kaj kvankam tiu ĉi manlibro estas tro mallonga por detale prepari vin pri ĉiu ebla situacio, vi jam havas tre firman fundamenton. Kaj reston vi povas lerni dum vi verkas, kiel faris ankaŭ nunaj plej spertaj Vikipedianoj. Do, en la sekva ĉapitro vi transformos viajn ĝisnunajn teoriajn spertojn al praktikaj – vi kreos vian uzanto-paĝon, unuan artikolon kaj unuan tradukon de artikolo! Ĉu vi pretas? Do, ek!

## REGISTRIĜO

`https://eo.wikipedia.org/wiki/Specialaĵo:Krei_konton`

Vikipedion vi povas redakti eĉ sen ensaluto. Tiaokaze, kiel redaktisto estos registrita anonimigita IP-adreso de via komputilo (tiajn redaktantojn ni kromnomas IP-uloj).

Tamen, ni rekomendas, ke vi kreu (senpagan) konton, ĉar por longtempaj uzantoj ĝi donas plurajn avantaĝojn. Ĉiuj redaktoj, kiujn vi faros estos notitaj sub via uzanto-nomo, kaj montros al aliaj komunumanoj viajn spertojn, vi konstruos vian reputacion. Vi havos proprajn uzanto-paĝon kaj uzanto-diskuton, kie vi povos prezenti vin kaj viajn interestemojn, kaj diskuti kun aliaj Vikipedianoj. Laste, vi povos adapti kiel Vikipedio aspektas kaj funkcias specife por vi, ekz. aliri specialajn ilojn disponeblajn nur por ensalutintaj uzantoj en Preferoj (kiel EnhavTradukilo, prezentita sube) kaj memprogramitaj helpiloj.



Ĝenerale estas rekomendate, ke vi havu nur 1 konton. Tamen, se vi pro sekurecaj kialoj ne volas ensaluti en fremda komputilo per via ĉefa konto, vi estas bonvena krei aldonan konton por tiaj okazoj. Ideale, travideble ligu la 2 kontojn, ekz. en ties uzantopaĝoj kaj subskriboj. Neniam en komunumaj balotoj voĉdonu per ambaŭ kontoj – tio estus konsiderata trompo.

## BAZA KONTRIBUADO PER VIDREDAKTILO

Dum la unuaj jaroj de Vikipedio, por redakti ĝin ni nepre bezonis lerni specialan formatigan kodon, tn. *vikikodon*. Tiu daŭre uzeblas kaj ni traktos ankaŭ ĝin iom poste, sed ĝi ne plu estas bezonata!

Intertempe ja teĥniko de Vikipedio iĝis pli amika. Nun vi povas redakti kaj formatigi tekston en Vikipedio simile kiel vi farus ekz. en LibreOffice Writer aŭ en retpoŝto. Vi tuj vidas kiel la rezulto aspektos (tn. “vidate-vidote”, aŭ angle “*WYSIWYG*”). Tian ĉi redaktadon ebligas *VidRedaktilo*.

### Via uzanto-paĝo


Kontribuadon per VidRedaktilo vi komencu lerni per kreo de via uzanto-paĝo, la paĝo kie vi mem povas prezenti vin. Ni komencas ĝuste tiel ĉi pro 2 kialoj:

1. uzanto-paĝoj helpas al kreo de **komunuma sento kaj amika etoso** en Vikipedio; tiel vi estos pli perceptata kiel vera homo, ne nur iu hazarda nomo en interreto, kio plialtigas vian fidindecon kaj helpas al kunlaborado kaj solvado de eventualaj konfliktoj;
2. uzanto-paĝo estas tre bona loko por komenci praktiki redaktadon – ĝi estas paĝo same kiel ĉiu alia kaj estas redaktata same, tamen, la komunumo estas multe pli akceptema pri neperfektaĵoj en uzanto-paĝoj ol en artikoloj.

Kiam vi ensalutas en vian uzanto-konton, tute supre de Vikipedio estas montrita via uzanto-nomo, kiu ligas al via (dume neekzistanta) uzanto-paĝo. Klaku al tiu ligilo kaj Vikipedio proponos al vi krei vian uzanto-paĝon.





Aperis tekstujo en kiun vi povas entajpi tekston. Por uzanto-paĝo estas rekomendate, ke vi koncize prezentu kiu vi estas, kie vi loĝas, kio estas viaj okupo kaj interesoj, kaj pri kio vi intencas labori en Vikipedio.





Nun restas formatigi la tekston por ke ĝi pli bone aspektu. La interfaco de VidRedaktilo provizas per butonoj por la plej kutimaj formatigaj taskoj. Vi ankaŭ povas uzi plurajn kutimajn rapidklavojn, ekz. *Ctrl+B* por grasigi tekston.


Elektu iun vian tekston kaj iom eksperimentu pri diversa formatado. Ekz. igu tekston grasa, alian tekston kursiva, kaj alian samtempe grasa kaj kursiva.




Unu el bonegaj ecoj de artikoloj de Vikipedio estas, ke ili ligas unu al alia. Tial ligiloj ege gravas! Plej kutime ni uzas ligilojn al aliaj artikoloj en Vikipedio (tn. *interna ligilo*). Fine de artikolo, kaj rare ankaŭ en ĝia ĉefa teksto, estas uzataj ligiloj al ekstera retejo. La formularo por aldoni internan ligilon provizas per sugestoj pri jam ekzistantaj artikoloj – tiam simple alklaku la sugeston por aldoni ĝin. La ligilo havos bluan koloron.




Vi povas aldoni ligilon al artikolo, kiu ankoraŭ ne ekzistas, kaj ni ofte faras tion! Tia ligilo tamen estos ruĝa.




Iujn okulkaptajn elementojn vi povas aldoni per la butono kun signo de +. Ni provu bildon. Bildoj (kaj aliaj dosieroj) estas stokataj en la frata projekto Komunejo. Ĉiu dosiero en Komunejo havas sian paĝon – vi bezonas scii nomon de tiu paĝo. Sed vi ankaŭ povas provi serĉi laŭ priskribo. Simile kiel la formularo por aldoni ligilon, ankaŭ la formularo por aldoni bildon provizas vin per proponoj por bildoj. Alklaku taŭgan bildon, eventuale skribu ĝian priskribon kaj fine konfirmu per la butono “Enmeti”.



Kiam vi kontentos pri via nova uzanto-paĝo, alklaku la bluan butonon "Publikigi", verku tre koncizan resumon pri kio vi verkis (ekz. "bazo de uzanto-paĝo") kaj konfirmu per la butono "Publikigi la paĝon".




Gratulon, vi kreis vian uzanto-paĝon! Kiam vi verkos artikolojn, estos aldonaj postuloj pri enhavo, sed la redaktado estas esence sama kaj vi jam kapablas almenaŭ baze fari ĝin!

## VIKI-KODA REDAKTADO


Nun vi jam baze kapablas redakti Vikipedion per VidRedaktilo. Tamen, ekzistas ankaŭ alia eblo por redakti – iom pli kompleksa sed multe pli potenca. Ĝi nomiĝas redaktado de *viki-kodo*, aŭ *fontkoda redaktado*.

Dum unuaj jaroj de Vikipedio ĝi estis la ununura maniero por redaktado. Por uzanto-paĝoj kaj artikoloj ĝi delonge ne plu estas tute necesa. Tamen daŭre eblas uzi ĝin, kaj multaj homoj ĝin preferas. Krome, pluraj tipoj de paĝoj (ekz. helpaj kaj pri-Vikipediaj) estas redakteblaj nur tiel ĉi. Do indas, ke vi almenaŭ baze konu viki-kodon kaj ne fortimiĝu vidante ĝin. Vi vidos,

sufiĉos iomete praktiki ĝin, kaj tio, kion vi bezonos estos por vi tre facila!

## Uzanto-paĝo en viki-kodo

Vi jam kreis vian uzanto-paĝon, do vi rigardu ĝin en viki-kodo. Por tion fari, venu al ĝia supro kaj alklaku la butonon “Redakti fonton” (se vi klakus “Redakti”, vi redaktus per VidRedaktilo). Vi vidos ion similan al tio ĉi 👇




Ĉiu formatigo, kiun vi faris per VidRedaktilo estas nun videbla en viki-kodo. Kiel vi povas rimarki, viki-kodo estas baze la kutima teksto kun kelkaj specialaj signoj – tiuj nomiĝas *formatigaj markoj*. Ekzistas pluraj formatigaj markoj, sed en kutima kontribuado vi probable uzados precipe nur kelkajn plej gravajn. Vidu ilin listigitaj en tabelo sur la sekva paĝo.

## FORMATIGAJ MARKOJ EN VIKI-KODO

| rezulta teksto | viki-kodo |
|---|---|
| **grasa teksto** | '''grasa teksto''' |
| *kursiva teksto* | ''kursiva teksto'' |
| ***grasa kursiva teksto*** | '''''grasa kursiva teksto''''' |
| Rekta ligilo al la artikolo Esperanto | Rekta ligilo al la artikolo [[Esperanto]] |
| Ligilo al Ĉefpaĝo povas havi malsamajn cellokon kaj tekston | Ligilo al [[Vikipedio:Ĉefpaĝo\|Ĉefpaĝo]] povas havi malsamajn cellokon kaj [[teksto]]n |
| Ekstera ligilo | [https://esperanto.wiki/ Ekstera ligilo] |
| Ĉefa sekcio<br>**Subsekcio**<br>**Subsubsekcio** | == Ĉefa sekcio ==<br>=== Subsekcio ===<br>==== Subsubsekcio ==== |
| ● sennumeraj listoj estas simplaj<br>● kaj estas plaĉaj<br>○ funkcias en pluraj niveloj<br>● kaj ankaŭ kun ŝanĝado de niveloj | * sennumeraj listoj estas simplaj<br>* kaj estas plaĉaj<br>** funkcias en pluraj niveloj<br>* kaj ankaŭ kun ŝanĝado de niveloj |
| 1. numeritaj listoj tre utilas<br>1. ili helpas al kalkulado de eroj<br>2. ili plibonigas tekston<br>3. en pluraj niveloj | # numeritaj listoj tre utilas<br>## ili helpas al kalkulado de eroj<br># ili plibonigas tekston<br># en pluraj niveloj |
| <br>Flago de Esperanto | [[Dosiero:Esperanto-flago (pligrandigita).svg\|eta\|Flago de Esperanto]] |

## NOVA ARTIKOLO

Gratulon! Post kreo de via uzanto-paĝo vi estas teĥnike preta por krei vian unuan artikolon! Ĉu vi por tio uzos VidRedaktilon aŭ vikikodan redaktilon dependas de via prefero – ili ambaŭ estas tute pretaj por la tasko!

Antaŭ ol vi eĉ komencos verki novan artikolon, konsideru kelkajn aferojn. Ĉu la temo estas menciinda? Ĉu vi havas sufiĉajn eksterajn, fidindajn, sendependajn fontojn, kiujn vi povos citi? Se ne, trovu alian temon! Vi povas inspiriĝi en alilingva Vikipedio kaj artikolon traduki, kio kutime estas signife pli facila kaj rapida ol verki ekde nulo. Pri tio vidu la sekvan parton pri EnhavTradukilo, kiu povas multe helpi vin.

Vi kreis vian uzanto-paĝon klakante al ruĝa ligilo direktanta al ĝi (ruĝeco indikas, ke la paĝo ankoraŭ ne ekzistas). Simile, unu el plej facilaj manieroj por ekverki novan artikolon estas klaki al ruĝa ligilo. Ili ofte troviĝas en aliaj artikoloj. Se vi ne trovas tian ligilon, vi povas aldoni ĝin al taŭga loko en taŭga artikolo aŭ via uzanto-paĝo. Alia eblo estas entajpi precizan nomon de volata artikolo en serĉilo – se la artikolo ne ekzistas, la serĉilo montros al vi ruĝan ligilon por krei ĝin.

Kaj kiel verki la *enhavon* de artikolo? Komencu per konciza kaj specifa altnivela difino aŭ priskribo de la temo. En korpo de la artikolo donu detalan klarigon pri la temo, menciu plurajn perspektivojn por respekti neŭtralan vidpunkton. Fine de la artikolo vi povas aldoni ligilojn al aliaj artikoloj en la sekcio "Vidu ankaŭ", kaj ligilojn al eksteraj retejoj (ekz. oficiala retejo pri la temo) en la sekcio "Eksteraj ligiloj". Vidu aliajn artikolojn kaj lernu de ilia stilo.

## ENHAVTRADUKILO

*Vidu pli:* `https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:EnhavTradukilo`

Traduki artikolon de alilingva Vikipedio povas multe helpi vin, precipe komence de via Vikipedia "kariero". Vi povas traduki artikolojn permane, sed ankaŭ uzi diversajn helpilojn, kiel *EnhavTradukilon*.

**EnhavTradukilo** (angle *Content translation*) estas traduka helpilo integrita en Vikipedion. Ĝi ne nur helpas traduki tekston, sed ankaŭ formatas ĝin laŭ Vikipediaj kutimoj kaj konektas la novan artikolon kun Vikidatumoj. Dum ĝia evoluigado estis taksataj diversaj labormanieroj de diversaj Vikipediistoj kaj la ilo provas subtenadi plejeble multajn.

EnhavTradukilo povas provizi ankaŭ per maŝina traduko por komenci tradukadon. Tiu povas esti relative bona, sed kutime en nesufiĉa lingva nivelo kaj **necesas lingve revizii kaj poluri ĝin**. Tia ĉi reviziado tamen montriĝis signife pli rapida ol dekomenca permana tradukado. Maŝina tradukado al Esperanto nuntempe funkcias por multaj lingvoj per la tradukiloj Apertium, Google Tradukilo, Yandex Tradukilo, kaj ankaŭ MinT (traduka sistemo disvolvita mem de la Fondaĵo Vikimedio). Estontece probable aldoniĝos pliaj helpiloj.

Kiam vi elektas artikolon por traduki, bonvolu elektu tian, kiu estas:

1. kun fontoj (kutime ili estas listigitaj en la sekcio "Referencoj")
2. sen avertoŝablonoj (ekz. "Tiu ĉi artikolo estas verkita kiel reklamo")
3. enhave kaj lingve ĝusta
4. ne ege mallonga (3 plenaj frazoj estas nur vere baza minimumo, celu pli multajn).

## Ekuzo de EnhavTradukilo

En la Esperanta Vikipedio estas EnhavTradukilo aŭtomate ŝaltita por ĉiu uzanto. En aliaj Vikipedioj vi eble bezonus ŝalti ĝin en viaj *Preferoj*, en la parto *Betaj funkcioj*.


Stirpanelon de EnhavTradukilo vi povas atingi per 3 manieroj:

- ▷ rekte venante al la Vikipedia paĝo *Specialaĵo:ContentTranslation* (skribu tion en la serĉa kampo)
- ▷ en falmenuo pri via konto, tute supre dekstre en ĉiu paĝo
- ▷ en la paĝo pri viaj kontribuoj, supre, en la parto “*Nova kontribuo*”

Se vi havas ŝaltitan EnhavTradukilon en alilingva Vikipedio, kaj se ankoraŭ ne ekzistas artikolo en Esperanto, inter intervikioj en la alilingva Vikipedio estos alvoko al traduko. Tiaokaze vi venos rekte al la traduka interfaco.

## Stirpanelo de EnhavTradukilo

En la stirpnelo de EnhavTradukilo vi povas inspiriĝi kaj komenci traduki iun el proponitaj artikoloj. Tiuj strebas esti similaj al aliaj artikoloj, kiujn vi kreis, por ke ili estu interesaj por vi.





Alternative, se vi jam scias kion vi volas traduki, daŭre en la stirpnelo alklaku la butonon „Nova traduko”. En la nove aperinta serĉujo elektu lingvon

de kiu volas traduki, poste entajpu nomon de alilingva artikolo kaj kiam ĝi aperos en fallisto, alklaku ĝin. Fine alklaku la butonon “Komenci tradukon”, kiu vin direktos al la traduka interfaco.

## Traduka procezo

EnhavTradukilo provizas per traduka interfaco kun 3 kolumnoj. En la maldekstra estas la origina artikolo, en la centra vi tradukos, kaj la dekstra donas helpajn ilojn.




Komencu tradukadon klakante en malplenan lokon en la centra kolumno. Por multaj lingvaj paroj aŭtomate aperos maŝina tradukaĵo (vi povas malŝalti maŝinan tradukadon, aŭ ŝanĝi maŝinan tradukilon en la dekstra panelo, la sekcio “Komenca traduko”). Zorge reviziu ĝin, laŭeble sen ŝanĝoj de enhavo. Se maŝina tradukaĵo ne aperis, traduku la tekston permane, laŭeble sen ŝanĝoj de enhavo.

Post zorga lingva kontrolo, klaku la supran butonon „Publikigi”. Bedaŭrinde, kvankam EnhavTradukilo multe helpas, ĝi ankaŭ inkludas nekutiman kodon en la tradukitan artikolon. Tial nepre venu al via ĵus publikigita artikolo, kontrolu ĉu ĉio enordas kaj eventuale redaktu ĝin. Tio povas esti pli facila per viki-koda redaktilo, ĉar pluraj artefaktoj postlasitaj de EnhavTradukilo malfacile videblas en VidRedaktilo.

# Citado

*Pli en* https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Citi_fontojn

Kiel ni menciis komence, en la principo de kontrolebleco, informoj en Vikipedio devas esti kontroleblaj en eksteraj, fidindaj fontoj. Tion ni faras citance la fontojn per referencoj. Baze, temas pri indiko de kie venas la prezentita informo.

Ideale, ĉiu aserto en Vikipedio citu sian fonton. Praktike, iuj asertoj estas pli indaj je citado. Temas precipe pri informoj pri vivantaj homoj, malfavoraj informoj, disputataj kaj minoritataj opinoj, precizaj citaĵoj, numeroj ks. Se referencoj en artikolo mankas, Vikipedianoj povas aldoni avertajn ŝablonojn al specifaj asertoj aŭ al la tuta artikolo. Lernu pli detale ĉe:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Referencoj

De teĥnika vidpunkto, referenco estas kreata per formatigaj markoj <ref>-testo de referenco</ref>. Metu tiujn markojn tuj post frazo aŭ aserto, kiun vi citas. Pli detale legu en:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Helpo:Referencoj_kaj_piednotoj

Por konservi koherecon en stilo de referencoj estas uzataj cit-ŝablonoj. Enmetu malplenan cit-ŝablonon inter la ref-markoj kaj tuj dekstre de egalsigno enmetu rilatan valoron. Ekzistas pluraj cit-ŝablonoj, do konsultu ilian uzadon ĉe https://eo.wikipedia.org/wiki/Kategorio:Citŝablonoj

Ekzemple, por citi gazetaran komunikon de UEA vi skribus jenan kodon:

```
<ref>{{Citaĵo el la reto
|url= https://uea.org/gk/1082a1
|titolo= Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Homaj
Rajtoj, 10 decembro 2022
|alirdato=2022-12-15}}</ref>
```

Fine de ĉefa artikola teksto enmetu sekcion *Referencoj*, kiu montros la liston de ĉiuj uzitaj referencoj.

```
== Referencoj ==

{{Referencoj}}
```

# Fino

Gratulon, nun vi jam baze kapablas kontribui al Vikipedio!

Ni esperas, ke tio ĉi estas via unua paŝo en via Vikipedia pado. Bonvolu tamen memori, ke tiu ĉi manlibro estas nur enkonduko al bazoj de Vikipedio kaj ne volas, nek povas prezenti ĉion, nek prepari vin al ajna situacio! Same kiel ĉiuj Vikipedianoj antaŭ vi, ankaŭ vi multon lernos dum verkado, imitante aliajn artikolojn, diskutante kun aliaj Vikipedianoj, kaj eble eĉ proponante novajn manierojn de kunlaborado.

Krom tiu ĉi manlibro ekzistas ankaŭ aliaj tre bonaj fontoj:

- libro *Vikipedio por vi* (2008) de Ziko van Dijk
- broŝuro *Vikipedio – praktika manlibro* (2007), redaktita de Yves Nevelsteen, ankaŭ disponebla ĉe `https://eo.wikibooks.org/wiki/Manlibro_pri_Vikipedio`

Ili provizas per pli vasta gamo de temoj kaj pluraj interesaj detaloj. Sed pro sia malnoveco ili ne povis inkludi iujn gravajn novigojn, precipe la Vid-Redaktilon kaj EnhavTradukilon, kiuj estis enkondukitaj pli ol 5 jarojn post ilia eldono. Ankaŭ tial tiu ĉi manlibro fokusiĝas precipe pri tiuj ĉi novigoj, kaj ekz. multajn detalojn pri viki-koda redaktado trairas rapide. Por pli profunda lernado vi povas kombini tiun ĉi manlibron kun la aliaj fontoj.

Ĉi tiu materialo estas publikigita sub la permesilo CC BY-SA 4.0 (Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda) `https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/deed.eo`

## LISTO DE BILDOJ

P. 1: ilustraĵo de Giulia Forsythe, CC0 `https://flic.kr/p/dsjUcW`
P. 16: Freedom of Panorama world map.png de Mardus, CC BY-SA 3.0
P. 17: Freedom of Panorama in Europe.svg de Revolus / Quibik, CC BY-SA 3.0

Kompostis Przemysław Wierzbowski

Co-funded by
the European Union

*Funded by the European Union. Views and opinions expressed are however those of the author(s) only and do not necessarily reflect those of the European Union or Erasmus+. Neither the European Union nor the granting authority can be held responsible for them.*

*Financita de la Eŭropa Unio. La esprimitaj vidpunktoj kaj opinioj tamen estas nure de la aŭtoro(j) kaj ne nepre reflektas tiujn de la Eŭropa Unio aŭ Erasmus+. Nek la Eŭropa Unio nek la organizo provizanta per la subvencio povas esti konsiderataj respondecaj por ili.*